

## Rasputin k. a.

Oldřich Arnoř Fischer

Prelego por esperantista Klubo Brno, la 8-an de decembro 2020

*Боже, Царя храни!  
Сильный, Державный,  
царствуй на славу,  
на славу намъ!  
Царствуй на страх врагамъ,  
Царь православный!  
Бо-о-же, Царя,  
Царя храни!*

Dio, protektu la Caron!  
Fortulo, Potenculo,  
reĝu por gloro,  
por nia gloro!  
Reĝu por timo de malamikoj,  
ortodoksa Caro!  
Di-i-o, la Caron,  
Caron protektu!

Komenco de ruslanda himno el la jaroj 1833-1917.

Rasputin estas tutmonde konata rusa familia nomo. Pri li oni verkis multe da libroj, faris kelkajn filmojn, eĉ komiksojn. Dum socialismo Rasputin estis menciita kiel unu el simboloj de putra carismo, sed ni ŝatis aŭskulti la kanton Rasputin (1978) de muzika grupo Boney M. Pri vivo kaj morto de Rasputin ekzistas multe da legendoj, sed kiu li vere estis?

### Infanaĝo de Rasputin

Rusa familia nomo Rasputin devenas el la vorto rasputje (*распутие*), disvojiĝo. **Grigorij Jefimoviĉ Rasputin** naskiĝis la 21-an de januaro {la 9-an de januaro de juliana kalendaro} 1869 en vilaĝo Pokrovskoje. Li estis la tria infano de libera kamparano, muelisto kaj ĉaristo **Jefim Jakovleviĉ Rasputin** (1841-1916). Lia pli aĝa frato Lavrentij mortis de pneŭmonio, lia fratino Marija dronis en rivero. Baldaŭ patrino ilin sekvis. Patro mem edukis malgandan Griŝon (Griŝa estas familia formo de Grigorij), sed ne tre sukcese. Griŝa ne vizitis lernejon, ĉar li devis labori hejme, manbatis kaj eĉ ŝtelis. Li ŝatis ĉevalojn.

Pri lia infanaĝo oni rakontis historieton, kiu antaŭdestinis lian venontan karieron. Iam en la vilaĝo Pokrovskoje iu ŝtelis ĉevalon. En domo de Rasputin najbaroj diskutis, kiu tion povis fari. Griŝa, kiu estis malsana de pneŭmonio, kuŝis, ne parolis kaj nur atenteme aŭskultis ardan diskuton de adoltuloj. Poste li ellitiĝis kaj diris la nomon de la kamparano, kiu laŭ lia opinio estis ŝtelisto. Kamparanoj al li ne volis kredi, ĉar tiu viro estis estimata vilaĝano, sed poste ili ĉe tiu vilaĝano la ŝtelitan ĉevalon vere trovis. Ĉiuj ekparolis pri profetaj kapablecoj de Griŝa Rasputin.

### Familia vivo

La 22-an de februaro 1887 Grigorij Rasputin edziĝis. Lia edzino **Paraskeva Fjodorovna** (fraŭlinnome **Dubrovina**), devenis el najbara vilaĝo. Al ili naskiĝis du filinoj (Matrjona, kiu ofte estis nomata Marija, kaj **Varvara**) kaj filo **Dimitrij**, kiu suferis de epilepsio. Bedaŭrinde Grigorij drinkis kaj ne ĉesis ĉasi virinojn. Verŝajne li sciis bone paroli kun virinoj, pli bele kaj interese ol aliaj kamparanoj. Tial li estis sukcesa amanto. Li estis malbona edzo kaj patro, ĉar li nur malofte estis hejme.

### Vivo en monaĥejo

Iam Rasputin veturigis junan studenton de teologio en Verĥoturje. La vojo estis longa, tial ili longtempe babilis. Grigorij al la studento rakontis pri sia malbona vivstilo, bedaŭris, ke li ne kapablas vivi pli honeste. La studento rakontis al li pri Kristo. Grigorij tiel forte ekvolis

pli bonan vivon, ke li sendis la ĉaron kun ĉevalo hejmen pere de unu samlandano kaj tri jarojn restis en la monaĥejo en Verĥoturje.

Kompare kun eŭropaj landoj, cara imperio estis tre postĝinta. Ekzemple en Aŭstrio servuteco estis aboliciita en la jaro 1781. En Ruslando la servuteco estis aboliciita nur en la jaro 1861. Multe da rusoj estis analfabetcaj, superstiĉaj kaj grandega problemoj estis alkoholismo. Inter rusaj nobeloj kaj kamparanoj estis profunda abismo. Kelkaj rusaj nobeloj volis fari reformojn, sed ilia klopodo dronis en vera rusa *ĥandra* (*хандра* - nostalgio). Sed ekzistis ankaŭ alia Ruslando! En erao de Rasputin en Ruslando vivis kaj laboris talentitaj homoj, kiuj signife kontribuis al tutmonda scienco kaj kulturo. **Dmitrij Ivanoviĉ Mendjelejev** (1834-1907) aranĝis ĥemiajn elementojn en perioda tabelo kaj eĉ prognozis ĉeeston de la elementoj, kiuj estis malkovritaj nur post lia morto. Ĥirurgo **Nikolaj Ivanoviĉ Pirogov** (1810-1881) precize operaciis. **Ivan Vladimiroviĉ Miĉurin** (1855-1935) hibridigis plantojn, **Ivan Petroviĉ Pavlov** (1849-1936) esploris refleksojn. Homoj aŭskultis muzikon de **Igor Fjodoroviĉ Stravinskij** (1882-1971) k. a. Pentristo **Ilja Jefimoviĉ Rjepin** (1844-1930) pentris siajn belegajn pentraĵojn. Verkistoj **Anton Pavloviĉ Ĉeĥov** (1860-1904), **Lev Nikolajeviĉ Tolstoj** (1828-1910), **Fjodor Miĥajloviĉ Dostojevskij** (1821-1881) k. a. penetris en profundecon de humana animo. **Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovskij** (1857-1935) eĉ okupiĝis pri teorioj de interplanedaj flugoj.

En cara Ruslando krome oficiala ortodoksa eklezio ekzistis multe da sektoj. Verŝajne en Pokrovskoje Rasputin aŭdis pri la sekto ĥlistanoj. *Хлыст* [ĥlist] = vipeto. La ĥlistanoj estis asketoj. Ili kreis je reenkarriĝo kaj havis la kutimon fini siajn diservojn per ritualaj koitoj. La monaĥejo en Verĥoturje estis loko por korektado de la monaĥoj, kiuj fariĝis sektanoj. Multaj monaĥoj estis ĥlistanoj. Verŝajne tie Rasputin (30-jara viro) ellernis legi kaj skribi. Li estis inteligenta, havis bonegan memoron, tial li ĉe la monaĥoj multe ellernis.

Post tri jaroj li revenis en la vilaĝon Pokrovskoje kiel pentulo. Li evitis alkoholon kaj viandon, kondutis bone, polite kaj amike. Ĉiuj vilaĝanoj miris, kiel Rasputin ŝanĝiĝis. Ili diris, ke Rasputin estas sankta viro. Eĉ loka popo vizitis Rasputinon, diskutis kun li kaj foriris kontenta. (Popo estas mallongiĝa vorto; поп estas la akronimo de la vortoj „paŝtisto de ortodoksaj ŝafoj“: *пастырь овец православных* (pastir *ov*ec pravoslavniĥ). Kompreneble, ke cara polico kaj eklezianoj interesiĝis, ĉu Rasputin ne endanĝerigas regantojn kaj ŝtaton. Sed Rasputin tute ne interesiĝis pri politiko.

### Vivo de dia viro

Li faris ekskursojn tra parto de Ruslando, Greklando kaj Jerusalemo. En la jaro 1903 li foriris en Sankt-Peterburgon, kie konatiĝis kun ortodoksa episkopo **Joan Kronŝtadskij** (1829-1908, propranome Ivan Iljiĉ Sergiĵev) kaj aliaj reprezentantoj de ortodoksa eklezio. Ili Rasputinon ekzaminis, sed eĉ strikta monaĥo **Iljodor** (1880-1952, propranome Sergej Miĥajloviĉ Trufanov) agnoskis, ke Rasputin estas vere dia viro. En la jaro 1904 Rasputin jam havis la titolojn **maljunulo** (kvankam li estis nur 35-jara), **malsaĝulo pro Kristo kaj dia viro**. La titolo maljunulo havis la signifon spirita gvidanto. Malsaĝuloj pro Kristo (ruse юродивые (jurodjivije), devenis el malnovrusa vorto юродъ (jurod) – malsaĝulo, frenezulo) estis la homoj, kiuj kondukis alie ol kredantoj. Ili kritikis ne nur regantojn, sed ankaŭ oficialan ortodoksan eklezion. Tiam en Ruslando estis multe da sanktaj homoj, pilgrimantoj, malsaĝuloj pro Kristo. Homoj ilin admiris kaj helpis al ili.

Sed fakte Rasputin estis nur kamparano el Siberio. Kiel li sukcesis penetri en caran korton?

### En cara korto

La caro **Nikolao la 2-a Aleksandroviĉ Romanov** (1868-1918), lasta caro el la dinastio Holstein-Gottorp-Romanov, estis filo de la caro Aleksandro la 3-a kaj Maria Fjodorovna, kiu estis danino. Post morto de sia patro Nikolao la 2-a edziĝis. Lia edzino Aliks

Hesena (germanino) ekuzis rusan nomon **Aleksandra Fjodorovna** kaj konvertis al ortodoksa kristanismo.

Lia edzino neniam renkontiĝis kun sia bopatro. En la jaro 1894 **Aleksandro la 3-a** (1845-1894, kromnomata Urso) mortis, ne de alkoholismo, sed de inflamo de renoj. Li estis vundita dum fervoja akcidento (1888), kiam li, granda fortulo, tenis tegmenton de ruino de fervora vagono ĝis la tempo, kiam ĉiuj aliaj vojaĝantoj sukcesis forkuri. Kaŭze de oficiala tristo eĉ kronado de Nikolao la 2-a okazis nur post 18 monatoj de morto de la caro.

En majo 1896 en Kampo Ĥodinskoje apud Moskvo oni aranĝis grandegan solenon de la kronado por popolo. Oni fabrikis suvenirojn, tasetojn kun portreto de nova caro, en Pilzeno (Bohemio, firmao Bartelmus). En la kampo oni aranĝis manĝaĵon, trinkaĵon kaj suvenirojn por granda amaso da homoj. Sed popola klaĉado la anoncon plibonigis: baldaŭ homoj ekkredis, ke ĉiu kamparano ricevis de la caro bovinon. Tial alvenis pli granda amaso da homoj ol aranĝantoj planis. Dum psiĥozo kaj ĥaoso, kiam homoj iris antaŭen por proksimiĝi al suveniroj kaj kozakoj inter ili „faris ordon“ per siaj vipoj kaj sabroj, mortis 1 400 homoj. Gecaroj kredis, ke tio estis signo de malfeliĉo.

Nikolao la 2-a ne estis feliĉa viro. Li apartenis al la plej riĉaj regantoj de la mondo, sed timis por heredita trono kaj grandega lando. Li timis de atencoj, ĉar en la jaro 1881 lia avo **Aleksandro la 2-a** (1818-1881) fariĝis viktimo de bomba atenco. Kaj post ses jaroj anarĥistoj el Popola Volo (*Narodnaja Volja*) nesukcese preparis atencon ankaŭ kontraŭ Nikolao la 2-a.

La carino **Aleksandra Fjodorovna** estis edukita virino. Ŝi travivis infanaĝon en britia korto. Ŝia avino estis reĝino Viktoria. Sed en Ruslando ŝi akceptis rusan vivstilon. Krom tio ŝi estis histeria, bigota kaj superstiĉa. Ŝi volis naski caridon, sed longtempe po du jaroj ŝi naskis filinojn (1895 **Olga**, 1897 **Tatjana**, 1899 **Maria**, 1901 **Anastasija**). Tial ŝi fariĝis mecenatino de diversaj ĉarlataĵoj. Nur en la jaro 1904 naskiĝis carido **Aleksej**, kiu suferis de hemofilio.

La hemofilio estas sanga malsano, kiu perturbas koaguliĝadon de sango. Pacientoj estas endanĝeritaj per ĉiu akcidento, kiu povas kaŭzi sangadon. La sangado atakas precipe renoj kaj artrojn. La hemofilio troviĝas nur ĉe viroj, sed ĝin transmitas sanaj, sensimptomaj virinoj. Britia reĝino Viktoria, avino de la carino, transmitis hemofilion en multajn eŭropajn nobelajn gentojn.

### **Alveno de Rasputin al cara korto**

La jaro 1905 estis por la monarĥio malfeliĉa. La strikoj de laboristoj kulminis la 22-an {9-an}de januaro 1905, kiam popo **Georgij Apolonoviĉ Gapon** (1870-1906) gvidis paceman manifestacion antaŭ caran palacon kaj armeo pafmortigis multe da homoj (Sanga Dimanĉo). Ekde februaro 1904 Ruslando batalis kontraŭ Japanio. La milito montris postiĝintecon de Ruslando, kiun japanoj venkis en marto 1905. La 27-an {14-an}de junio 1905 ekribelis maristoj de Krozŝipo Potjomkin Taŭridskij. Sed por la caro estis la plej signifa evento de la jaro 1905 vizito de dia homo Rasputin.

Du versioj pri tio, kiel Rasputin penetris en la korton, ekzistas. Kiam dujara carido suferis de sangado, montenegra ĉefprincino **Milica Petroviĉ-Njegoŝova** (1866-1951) invitis Rasputinon. Ŝi kaj ŝia fratino **Anastasija** (origine Stanja, 1868-1935) okupiĝis pri okultismo kaj admiris Rasputinon. Laŭ alia versio estroj de ortodoksanoj volis havi sian agenton en cara korto, tial ili al Rasputin helpis.

La 1-an de novembro 1905 en Carskoje Selo, cara rezidejo. Maljuna carido Aleksej ploris, lia vundo sangis, kuracistoj kapablis nur ŝanĝi bandaĵojn. En tiu situacio aperis siberiano Rasputin en la ĉambro. Li senskrupule kamparanmaniere brakumis la caron, poste la carinon kaj diris, ke ilia filo ne mortos. Poste li kliniĝis antaŭ ikono kaj preĝis. Aleksej lin observis. La kamparano estis barbulo, ŝvitita, malpura, malodoranta, sed li havis belajn blankajn okulojn kaj profundan voĉon. Li ekrakontis strange, sed tiel interese, ke Aleksej lin

aŭdis kaj poste ekdormis. Rasputin ne havis la potencon haltigi la sangadon, sed li kapablis la knabon trankviligi. La vundo jam ne sangis, kortuŝita carino dankis al Rasputin pro savo de sia filo. Ekde tiu tempo Rasputin fariĝis amiko de gecaroj kaj havis super ili grandegan influon.

En la jaro 1906 li petis ŝanĝon de sia familia nomo al Rasputin-Novih.

Li ricevis specialan funkcion: la gardisto de caraj lampoj. Pena laboro, ĉu jes? Li estis admirata kaj ŝatata, ĉar li havis sufiĉe da mono. En la jaro 1910 li invitis en Sankt-Peterburgon siajn du filinojn Matrjonan kaj Varvaran, por ke ili tie studu en mezlernejo.

Ĉiam, kiam Rasputin malproksimiĝis de Carskoje Selo, sanstato de la carido plimalboniĝis. Kiam Rasputin revenis, la carido preskaŭ resaniĝis. Tio ne estis kaŭzata nur per sugestaj efikoj de ĉarlatano Rasputin, sed ankaŭ per medikamentoj, kiujn kunlaborantoj de Rasputin (korta damo **Anna Aleksandrovna Virubova** (1884-1964) kaj burjata kuracisto, doktoro de tibeta medicino **Pjotr Aleksandroviĉ Badmajev** (1851-1920) kaŝe aldonis en manĝaĵon. La medikamentoj kaŭzis sangadon.

En Sankt-Peterburgo Rasputin lernis hipnozon. Lia instruisto atestis, ke Rasputin havis tre fortan volon, kiun kapablis bone uzadi.

### **Stranga vivo de Rasputin**

Cara polico Rasputinon kaŝe observis. Li ne kondukis kiel sanktulo, ĉar li drinkis, ofte estis ebria kaj ĉasis virinojn. Sed ankaŭ la virinoj ĉasis lin. Modo estis havi sekson kun dia viro. Krom tio Rasputin havis bonegan memoron, tial edzoj de adultulinoj faris bonan karieron. Rasputin helpis al multe da homoj. Li ne estis avarulo. Samtempe li venĝis al tiuj, kiuj lin en pasinteco subpremis, precipe al ekleziestroj. Ekzemple li uzis sian grandan influon por instali monaĥon Varnavan, kiu estis granda ebriulo, en la funkcion de ortodoksa episkopo en Tobolsk. Tial Rasputin havis ankaŭ malamikojn. Li konkuris al multe da aliaj ĉarlatanoj, sed precipe lin ekmalŝatis ortodoksaj popoloj, kiuj al li antaŭe helpis, ekzemple la monaĥo Iliodor. Ili provis oferti al Rasputin multe da mono, por ke li foriru. Sed Rasputin estis obstina. Tial la 16-an de julio 1911 lin invitis episkopo **Germogen** (1858-1918, propranome Georgij Jefremoviĉ Dolganov) en sian rezidejon. Diskuto pri kredo baldaŭ ŝanĝiĝis je kverelo, viroj uzis multe da malbelaj vortoj. La episkopo prenis pezan bronzan krucon kaj batis kapon de Rasputin. Iliodor kaj alia monaĥo Rasputinon tenis, tial Rasputin ne povis sin defendi. Terure batita Rasputin devis surgenuiĝi antaŭ bildo de Dia Patrino kaj juri, ke li forlasos caran korton kaj Sankt-Peterburgon kaj neniam plu revenos. Nur poste la eklezianoj estis kontentaj. Ili opiniis, ke la kazo Rasputin finiĝis. Sed ili forgesis, ke ili havis konflikton kun senskrupula ĉarlatano. Rasputin al ili promesis ĉion, sed plenumis nenion. Li iris al la carino kaj plendis. La episkopo Germogen estis strikte punita. La monaĥo Iliodor ĝustatempe fuĝis en Norvegion. De tie li batalis kontraŭ gecaroj kaj Rasputin pere de kampanjo.

Rasputin malproksimiĝis. Li faris pilgrimon en Jerusalemon.

En la jaro 1912 Rasputin rekomendis al caro ne entiri Ruslandon en balkanan militon (1912-1913).

### **Atenco**

Malamikoj de Rasputin volis lin katri, sed Rasputin estis avertita kaj evitis traŝon. Liaj malamikoj multfoje volis lin murdigi. Ili volis lin dronigi en la maro. En luksa malĉastulejo Vila Rode savis Rasputinon liaj personaj gardistoj.

La 16-an de junio 1914 alvenis en Pokrovskoje **Ĥionija Kuzminiĉna Guseva** (1881-?). Malamikoj de Rasputin al ŝi promesis, ke se li murdigos la „diablon“, Dio perdonos al ŝi ĉiujn ŝiajn pekojn. Tio estas la propono, kiun oni ne malakceptas. Ŝi aĉetis tranĉilon kaj vestita en sakaĵo embuskis Rasputinon. La 29-an de junio ili hazarde renkontiĝis sur la strato. Guseva ekalmozis. Rasputin ekserĉis monon en sia monujo. En tiu momento Guseva pikis

Rasputinon en ventron tiel profunde, kiel ŝi kapablis. Guseva estis malliberigita, sed ne juĝita. Liaj protektantoj ŝin kaŝigis en psiĥiatran malsanulejon, kie ŝi restis ĝis la 27-an de marto 1917. Post la atenco Rasputin estis en kriza sanstato. Li perdis multe da sango kaj estis dufoje operaciita. Sed korpo de siberiano rezistis eĉ tiun insideman atencon. Rasputin la atencon transvivis. La 17-an de aŭgusto 1914 li forlasis malsanulejon de Tjumeni.

### **La unua mondmilito**

Tiam cara armeo jam helpis al serboj. Ĝi estis en malbona kondiĉo. Ruslandaj soldatoj estis bravaj kaj harditaj, sed la armeo estis postiginta. Se germanoj volis havi bone trejnitaĵn kaj bonege ekipitajn soldatojn, rusoj opiniis, ke iliaj soldatoj ne bezonas tiel precizan trejnadon kaj ekipon, sed ili devas esti multenombraj. Nur se unu soldato falis, lia najbaro povis batali per la komuna pafilo. En kelkaj regimentoj al soldatoj mankis pafiloj. Du soldatoj havis nur unu komunan pafilon. Nur se unu soldato falis, lian pafilon prenis lia najbaro kaj povis batali.

Militestro de cara armeo estis ĉefprinco **Nikolaj Nikolajeviĉ Romanov** (1856-1929), edzo de la ĉefprincino Anastasija. Dumetra viro estis inter soldatoj favorata, li havis la honoran kromnomon Nikolaŝa (Nikolaego). Milica kaj Anastasija komence helpis al Rasputin, sed poste ili ektimis, ke li havas malbonan influon je gecaroj. Vane ili volis ilin averti, ke Rasputin estas danĝera viro. Nikolaj Nikolajeviĉ malamamis Rasputinon, ĉar li sciis, ke Rasputin estas ĉarlatano. En la jaro 1915 rusoj retiris el Galicio, Pollando kaj parto de ĉebaltaj ŝtatoj. Rasputin intrigis kontraŭ la militestro kaj sugestis al la caro faris radikalajn paŝojn. La caro sian militestron eksigis kaj mem fariĝis ĉefa militestro de la armeo. Tio estis komenco de katastrofo, ĉar la caro ne estis sperta soldato.

Carino kun siaj kvar filinoj eklaboris en malsanulejo, kie ili zorgis pri vunditaj soldatoj. En tiu malbona situacio gecaroj kredis al Rasputin. Nekredeble, ke siberia kamparano plene ekmajstris penson de la carino kaj pere de la carino influis la caron. Onidiro pri amrilato de la carino al Rasputin ne povas esti veraj. Rasputin estis inteligenta kaj ne volis riski skandalon en la korto. Li la gecarojn tre respektis.

En la jaro 1916 rusa generalo **Aleksej Aleksejeviĉ Brusilov** (1853-1926) pretigis ofenzivon, kiu daŭris ekde la 4-an de junio ĝis oktobro. Rasputin „helpis“ per siaj konsiloj al la carino kaj kaŭzis pli grandan ĥaoson. Rasputin volis ĉesi la militon, fari pacon kun Germanio.

### **Morto de Rasputin**

Liaj malamikoj decidis pri atenco. Detaloj de tiu ĉi evento, kiu okazis la 30-an {17-an} de decembro 1916, ne estas klaraj, ĉar la atencistoj multfoje ŝanĝis siajn depoziciojn, dokumentoj ofte mankas kaj pri la afero interesiĝis ruslanda kaj britia registaroj. Princo **Feliks Feliksoviĉ Jusupov** (1887-1963), potenca aristokrato, uzis kiel logaĵon sian propran edzinon. **Irina Jusupova** neniam renkontiĝis kun Rasputin, tial li estis scipova, kiel ŝi aspektas. Aliaj aliancanoj estis deputisto de Dumao (Parlamento) **Vladimir Mitrofanoviĉ Puriŝkeviĉ** (1870-1920), kiu estis dekstrulo, monarĥisto kaj antisemito, lejtanto **Sergej Miĥajloviĉ Suĥotin** (1887-1926), ĉefprinco **Dmitrij Pavloviĉ Romanov** (1891-1942). Oficiro de britia sekreta informa servo **Oswald Theodore Rayner** (1888-1961) ludis malklaran rolon. La atenco okazis en palaco de Jusupov. Kelo de la palaco estis bele aranĝita. Vespere Jusupov kaŝe alkondukis Rasputinon en la kelon. Neniu sciis, kien Rasputin foriris el sia loĝejo. Lasta persono, kiun vidis lin vivantan estis korta damo Anna Virubova. Jusupov pardonpetis Rasputinon, ke supre ankoraŭ amuziĝas liaj gastoj, kaj petis lin atendi lian edzinon. Rasputin aŭdis voĉojn kaj muzikon. Sur tablo estis kukoj kaj vino. Laŭ unu versio kuracisto **Stanislao Lazovert** la kukojn kaj vinon venenigis per kalia cianido. Rasputin manĝis la kukon kaj trinkis la vinon. Supre la atencantoj atendis lian morton aŭskultante gramofonan muzikon. Sed kial Jusupov alvenis en la kelon, Rasputin vivis. Jusupov volis Rasputinon pafmortigi,

sed nur lin vundis. Kun helpo de kunatencistoj li Rasputinon murdigis. Por alibio unu el atencantoj, la lejtanto Suhotin, vestiĝis simile kiel Rasputin, kuracisto Lazovert uzis sanitan aŭtomobilon kaj forveturigis falsan Rasputinon. Se iu vidis la aŭtomobilon, li povis pensi, ke Rasputin foriris hejmen.

La 1-an de januaro 1917 oni anoncis, ke korpo de Grigorij Jefimoviĉ Rasputin estis trovita sub glaco en la rivero Malaja Njevka sub la ponto Petrovskij. Unue iu trovis sangan sur la ponto, poste ŝuon de Rasputin, truon en glaco kaj sub la glaco kadavron de Rasputin.

**Dmitrij Petroviĉ Korosotov** (1856-1920), profesoro de Armea Kuracista Akademio, la kadavron obdukciis. Originalo de obdukcia protokolo „hazarde“ malaperis. Rasputin ne estis pakita en kovrilo, sed vestita en pelto. Li havis katenitajn nek brakojn nek kruojn. Antaŭ morto li estis kruele batita. Multaj vundoj estis faritaj post la morto. Li ne estis pafita en koron, sed havis tri mortajn vundojn: en hepato, en reno kaj en kapo. En lia stomako estis neniu veneno. En lia pulmo ne estis akvo, tio signifas, ke oni lin ĵetis en la akvon nur post lia morto. Nur unu kuglo estis trovita, sed ĝi estis tre deformita. Laŭ rusa versio de Vikipedio iu pafis la kapon de Rasputin per britia revolvero (la tipo Webley 455). Sed britia versio de Vikipedio la partoprenon de brita agento kontestas. Se ni ne havas originalon de la protokolo, ni ne scias, kion vere la profesoro trovis.

Ĉu Rasputin estis venenigita per kalia cianido? Laŭ kelkaj versioj kuracisto Stanislao Lazovert donis la cianidon en kukojn kaj vinon. Adolta homo estas mortigita per la dozo 200-300 mg, sed se stomako estas plena, la venenado daŭras kelkajn horojn. En la jaro 2016 estis en rusa interreta ĵurnalo Ria Novosti publikita artikolo pri meksikiano **Victor Manuel Contreras**, kiu en sia privata arĥivo havas leteron de doktoro Lazovert al princo Jusupov. Li konfesis, ke li volis observi juron de Hipokrato, ne murdigi, tial li anstataŭ cianido uzis nevenenan substancon. Detaloj pri la letero (dato, loko de skribado) en la artikolo ne estis publikitaj.

Korpo de Rasputin estis entombigita en la parko Aleksandrovskij en Carskoje Selo. Sed jam la 11-an de marto 1917 studentoj, laboristoj kaj soldatoj Rasputinon eltombigis kaj bruligis. Lia cindro estis entombigita en la tombejo Piskarevskoje.

### **Sortoj de cara familio kaj infanoj de Rasputin**

La 15-an de marto 1917 la caro Nikolao la 2-a abdikis. Lia posteulo, frato **Miĥailo** regis nur unu tago, sed post la abdikado li ne difinis, kiu regos post li. Tial finis regado de dinastio Holstein-Gottorp-Romanov en Ruslando. Familio de caro loĝis en Tobolsk. La 17-an de julio 1917 ĉekano **Jakov Jurovskij** kaj aliaj bolŝevikoj tutan familion de caro murdigis en domo de Ipatjev en Jekaterinburg. Ankaŭ frato de la caro Miĥailo kaj fratino de la carino Jelizaveta estis murditaj.

Edzino de Rasputin revenis en sian naskan vilaĝo. Varvara mortis de tifo, Dimitrij mortis de dizenterio. Marija, edzino de **Boris Solovjev** kaj patrino de du filinoj, elmigris en Eŭropon (Prago, Parizo) kaj Usonon, kie ŝi vivis kaj en la jaro 1977 mortis.

Rasputin vere estis la ĉarlatano, sed post lia morto lin anstataŭis eĉ pli danĝeraj kaj pli potencaj ĉarlatanoj, kiuj kaŭzis suferon kaj morton de milionoj da homoj.

### **Rekomendita literaturo**

BOROVICKA, V. P. 1992: Atentáty, které měly změnit svět. 1-a eld., Prago, Svoboda, 198 paĝoj.

ДАЛЬ, В. И. 2009: Толковый словарь русского языка. Современное написание. 1-a eld., Москва Астрель, 983 paĝoj.

- FISCHER, O. A. 2016: Karel Havlíček Borovský (1821-1956) – kontribuo al la 160-a datreveno de lia forpaso. Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 24-an de februaro 2016. – [http://esperantobrna.cz/malnova/fischer\\_karel-havlicek-borovsky-160224.pdf](http://esperantobrna.cz/malnova/fischer_karel-havlicek-borovsky-160224.pdf) .
- HAVLÍČEK BOROVSÝ, K. 1981: Obrazy z Rus, paĝoj 63-156. En: KRONUSOVÁ, V. (ed-ino): Karel Havlíček Borovský. Vojna s hloupostí a zlobou, 1-a eld., Prago, Svoboda, 302 paĝoj.
- HORA-NOŘEJŠ, P. 2016: Toulky českou minulostí, la 14-a volumo. 1-a eld., Prago, Via Facti, 239 paĝoj.
- IZAKOVIČ, I. 1988: Rasputin a carevna. 1-a eld., Prago, Československý spisovatel, 568 paĝoj.
- КУПРИН, А. И. 1973: Повести. Молох. Поединок. 1-a eld., Москва, Детская литература, 239 paĝoj.
- PUTNA, M. C. 2015: Obrazy z dějin ruské religiozity. 1-a eld., Prago, Vyšehrad, 335 paĝoj.
- SLÁNSKÁ, N. 2020: Pohnutý osud Rasputinovy dcery: vystupovala v cirkuse než ji potrhla medvěď. <https://www.dotyk.cz/magazin/rasputin-dcera-maria-osud-30000926> .
- VASILJEVOVÁ, Z. 1986: Dějiny Japonska. 1-a eld., Prago, Svoboda, 604 paĝoj.
- ЗНАМЕНСКИЙ, Д. 2016: «Мексиканец, упавший с небес». Распутина перед убийством не отравляли. <https://ria.ru/20160502/1429794181.html> .